

# Brazila Esperantisto

(“O ESPERANTISTA BRASILEIRO”)

OFICIALA ORGANO DE  
BRAZILA ESPERANTO-LIGO


Societo de publika utileco, lau registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro: **A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor principal): D-ro Carlos Domingues

REDAKCIO — Praça da República, 54, 1º

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio  
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO



BELO HORIZONTE — Urbo de la XII-a Brazila Kongreso de Esperanto.  
Parta vidajo de Placo de Libereco, kie staras la Palaco de Libereco, de  
la Stata Registaro.



**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**  
**(B.E.L.)**  
**e**  
**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
**(U. E. A.)**

*Quota de adesão para 1950*

Os sócios de toda categoria recebem a carteira de membro, os cupões de serviço e a revista "Brazilia Esperantisto", órgão oficial da Liga Brasileira de Esperanto.

<i>Categoria</i>	<i>Cr\$</i>
AM (Asocia Membro: Membro simples .....	20,00
MJ (Membro kun Jarlibro: membro com direito ao "Anuário" de U.E.A. — 1. <sup>a</sup> parte em abril, 2. <sup>a</sup> parte em outubro) .....	40,00
MA (Membro-Abonanto: membro assinante). Recebe o "Anuário" e a revista mensal "Esperanto" de U. E. A. ....	100,00
MS (Membro-Subtenanto: membro mantenedor). Recebe o mesmo que o MA. Paga obsequiosamente uma quota mais alta para auxiliar as duas instituições .....	200,00
PATR. (Patrono). Recebe o mesmo que o MA. Paga benevolmente o decuplo da quota desse para auxiliar a mais eficaz propaganda internacional .....	1.000,00
DM (Dumviva Membro: membro vitalício). Paga de uma só vez a importância correspondente à adesão como MA por toda a vida ..	2.000,00

As importâncias devem ser remetidas em vale postal ou cheque bancário a:

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO  
 Praça da República, 54 — 1.<sup>o</sup>  
 RIO DE JANEIRO, D. F.

Nos lugares em que há instituição filiada, a adesão às organizações nacional e universal faz-se de preferência por intermédio dela. Nas cidades em que não existe tal instituição, instantemente pedimos aos nossos sócios isolados que promovam a sua fundação, para o que nos pomos à disposição dos interessados.

Todo membro da categoria MA, pelo menos, poderá, conhecendo regularmente o Esperanto, exercer na sua cidade a função de Delegado,

Vice-Delegado ou Delegado de alguma especialidade, e o seu nome e endereço figurarão no «Jarlibro».

Os sócios da categoria MA ou mais, que aderirem até o mês de Março de 1950, receberão como prêmio um exemplar da rica brochura «Urbo Belo Horizonte», editada pelo Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística.

**Concurso entre as associações**

No concurso para 1949, cujas bases foram publicadas nos nossos números de Julho-Setembro e Outubro-Dezembro de 1948, foram vencedores: em 1.<sup>o</sup> lugar o Brazilia Klubo «Esperanto», do Rio de Janeiro, com 436 pontos; em 2.<sup>o</sup>, a Sociedade Mineira de Esperanto, com 94 pontos, o Kristana Esperanto-Klubo, de Belo Horizonte, com 86, a Esperantista Societo de Pôrto Alegre, com 78, o Centro Esperantista de Santos, com 74, e o Centro Esperantista Granberriense, de Juiz de Fora, com 52. Essas associações receberão livros para as suas bibliotecas, conforme as condições do concurso.

Instituímos agora um novo concurso para 1950, semelhante ao internacional estabelecido pela Universala Esperanto-Asocio; do concurso da U.E.A. para 1949 daremos o resultado no próximo número com a contribuição de cada associação brasileira para a quota final da B.E.L.

As condições do nosso concurso de 1950 são as seguintes:

1) Por cada membro que pagar a sua quota serão marcados pontos desta maneira: membro simples (AM), 1; membro com direito ao «Anuário» (MJ), 5; membro-assinante (MA), 10; membro mantenedor (MS), 15; patrono (Patr.), 50; membro vitalício (DM), 50.

2) As três associações que mostrarem maior progresso em 1950, em relação ao total que obtiveram no ano anterior, será concedido um prêmio em livros para a sua biblioteca, no valor de 10% das contribuições efectivamente pagas por cada uma delas.

3) As associações terão a faculdade de escolher os livros, dentre os que se encontram à venda no país.

**Diplomas de Esperanto**

As questões relativas à língua auxiliar internacional são da competência da Academia de Esperanto. É, pois, da sua alçada a regulamentação geral da expedição de diplomas, expedição que, em cada país, é feita exclusivamente pela respectiva associação nacional em nome da Academia. O contrôlo da Academia é condição es-

(Continua à página 16)



# BRAZILA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO  
de BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Direktoro: A. CAETANO COUTINHO  
Respondeca redaktoro: CARLOS DOMINGUES

43-a Jaro

N. 427 — 429

SENPAGA POR ANOJ DE

B. L. E.

Eksterlande: unu dolaro au  
12 respondkuponoj

OKTOBRO-DECEMBRO 1949

Administracio kaj redakcio  
Praça da República, 54, 1º  
Telefona: 42-4357

Rio de Janeiro — Brazilo

## XII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Dank'al la senlaca laboro de la eminenta Organiza Komitato dum tuta jaro kaj al la altvalora apogo de la Registaroj de Ŝtato Minas Gerais kaj de Ĉefurbo Belo Horizonte, nia tutlanda kongreso, en Septembro de 1949, estis grandioza manifestacio por Esperanto.

Lia Ŝtatestra Moŝto D-ro Milton Soares de Campos ne sendis reprezentanton, kiel ordinare faras Ŝtatestroj: li venis persone kaj legis brilan paroladon pri niaj lingvo kaj movado, kaj tiel li klare montris sian scion pri la temo kaj sian entuziasmon por nia laboro. Dum la preparado de la Kongreso li donis al la O.K. la tutan moralan apogon de sia Registaro kaj subvenciis la Kongreson per la sumo de Cr\$ 30.000,00, ĝis tiam la plej grandan monhelpon al Esperanto, iam donitan en Brazilo.

Ankaŭ la Eminentia Urbestro, eksministro D-ro Octacílio Negrão de Lima, petis de la Urba Parlamento specialan krediton de Cr\$ 30.000,00, por helpi la preparadon de la Kongreso. La speciala leĝo estis unuanime aprobita de la urbaj leĝfarantoj kaj urĝe sankciita de la Urbestro, kiu regalis la kongresanojn per bankedo kaj prezidis mem la Solenan Ferman Kunsidon de la Kongreso.

Minas Gerais estas unu el la Ŝtatoj de Unuigitaj Ŝtatoj Brazilo. Ĝia surfaco estas

585.800 kvadrataj kilometroj, t.e. iom pli granda ol Francujo (550.926 kv.k.), Germanujo (472.034 kv.k.) kaj aliaj grandaj regnoj de la malnova mondo. Ĝia kulturgrado estas rimarkinde alta kaj ĝiaj naturaj ekonomiaj rimedoj estas nekalkuleblaj. La ĉefurbo, Belo Horizonte, konstruita en 1897, konsistanta el rektaj larĝaj stratoj kaj avenuoj kun ĝardenoj en la centroj, belaj parkoj kaj publikaj ĝardenoj, estas unu el la plej belaj modernaj urboj en la mondo. Ĝi havas loĝantaron el 350.000 homoj kaj tre rapide progresas.

La entuziasmo de la Registaro, gazetaro kaj popolo de Minas Gerais por la afero Esperanto estas granda espero por nia movado.

Jen resumo de la Ĝenerala Raporto pri la brila XII-a Brazila Kongreso de Esperanto.

## RADIO KAJ GAZETARO

La oficiala departemento de la Brazila Registaro, «Agência Nacional», sendis al la Kongreso du el siaj ĵurnalistoj, nome S-rojn Orlando Yperoig Bello de Carvalho kaj Juarez G. Mata Machado, kiuj akompanis la tutan Kongreson kaj filmis la ĉefajn programerojn. La oficiala Radio-Stacio de Ŝtato Minas Gerais, per sia fama PRI 3, disradiis la programon de la Solena Malferma Kunsido per ondoj longaj kaj mallongaj kaj faris specialan programon en Esperanto por la



Kongreso, sub gvidado de nia samideano D-ro Wilson Veado, kiu de pluraj jaroj estas direktoro de la programo «Brazila Kroniko». Per la radiostacioj «Mineira» kaj «Guarani», la direktoro de la programo «Per-telefona Konversacio», S-ro Francisco Andrade, plurajn fojojn parolis pri la Kongreso kaj pri Esperanto. La tuta gazetaro de Belo Horizonte kaj de la lando aperigis informojn pri la Kongreso, dank'al la tutlanda servo de la «Agência Nacional». Ni multe ŝuldas al la radiostacioj kaj gazetaro de Brazilo, ĉar malmultaj Esperanto-kongresoj havis tian ampleksan propagandon.

### EKSPOZICIO DE ESPERANTAĴOJ

En la 20a de Septembro estis inaŭgurita la ekspozicio de gazetoj, libroj, afiŝoj, poŝtkartoj, glumarkoj kaj aliaj esperantaĵoj, inteligente organizita de S-ro Gabriel Augusto de Gouvêa. Ĉe la solena malfermo de la Ekspozicio, en nomo de la Kongreso paroladis D-ro Aristóteles Juvenal de Faria Alvim. La nova kaj korespondema samideano S-ro Francisco S. Almada, el Santos, alportis por la Ekspozicio riĉan kolekton de siaj propraj esperantaĵoj.

La bela ĉambro por la Ekspozicio estis en Klubo «Belo Horizonte», grava amuza kaj kultura rondo, kies prezidanto, S-ro Kolonelo Francisco Brandão, ĝentile cedis la sidejon por nia Ekspozicio kaj disvendado de filatelaj memoraĵoj pri la Kongreso. En tiu ejo funkciis la Kongresa Poŝtoŝeĵo kun speciala stampilo memoriga pri la Kongreso.

### PREPARA KUNSIDO

En la festsalono de la luksa kaj moderna Hotel Finacial, ĝentile cedita de siaj posedantoj, efektiviĝis ĉiuj laborkunsidoj kaj la Prepara Kunsido de la Kongreso. Sub prezido de Supera Juĝisto D-ro Arnaldo de Alencar Araripe, prezidanto de la O.K., efektiviĝis en la vespero de la 20a de Septembro la Prepara Kunsido. La Prezidanto, per bela parolado, salutis la Kongresanojn kaj sciigis, ke la ĉefa punkto

de la kunsido estas baloti la Estraron de la Kongreso. S-ro Ismael Gomes Braga proponis, ke la elekto de la Estraro estu farita per akklamado, kaj legis liston da nomoj, kiuj estis aklamitaj. La aklamita Estraro estis: Prezidanto — Supera Juĝisto D-ro Mário Matos, el Belo Horizonte; 1-a Vicprezidanto — Prof. A. Caetano Coutinho, el Rio de Janeiro; 2-a Vicprezidanto — D-ro Gentil Fernandes, el ŝtato Rio Grande do Norte; 3-a Vicprezidanto — D-ro Miguel Timponi, el Rio de Janeiro; 4-a Vicprezidanto — D-ro Giovanni P. Faraco, el ŝtato Santa Catarina; Ĝenerala Sekretario — D-ro Mário Ritter Nunes, el ŝtato Rio de Janeiro; 1-a Sekretario S-ro Francisco S. Almada, el Santos, ŝtato S. Paŭlo; 2-a Sekretario — Fraŭlino Irani Baggi de Araujo, el Rio de Janeiro; 3-a Sekretario — S-ro A. Afonso Costa, el Belo Horizonte; Kasisto — S-ro Misael Alves Mendes, el Belo Horizonte, iama kasisto de la O.K. La Prezidanto de la Kunsido nomis specialan Komisionon por akcepti la Prezidanton de la Kongreso kaj lin enoficigis. D-ro Mario Matos enoficigis la ceterajn membrojn de la Estraro kaj nomis la komisionojn kaj subkomisionojn por la laboroj de la Kongreso. En brila parolado la ĵus elektita Prezidanto dankis al la kongresanoj sian elekton por prezidi la Kongreson kaj fermis la kunsidon.

### MONUMENTO AL ZAMENHOF

Je la 9-a horo de la 21-a okazis la solena inaŭguro de la loko, kie iam staros la monumento al D-ro Zamenhof, sur Placo Esperanto. Oni tie starigis la fundamentan ŝtonon, kun ĉeesto de D-ro Carlos Avelar, reprezentanto de Lia Urbestra Moŝto, kaj D-ro Noraldino de Melo Castro, urba parlamentano, kiu faris la oficialan paroladon de la inaŭguro.

### FILATELA GIĈETO

En la sama 21-a oni inaŭguris filatelan giĉeton por stampado de korespondaĵoj per memoriga stampilo pri la Kongreso. Paroladis en nomo de la Kongreso D-ro Lin-



coln Martins Viana, kaj en nomo de la Departamento de Poŝtoj kaj Telegrafoj D-ro Hermelindo Paixão, regiona Direktoro de tiu Departamento.

SOLENA MALFERMA KUNSIDO

En la luksa aŭditorio de Instituto de Edukado, je la 20-a kaj 30 minutoj de la 21-a, efektiviĝis, sub prezido de Lia Ŝtatestra Moŝto D-ro Milton Soares de Campos la Solena Malferma Kunsido. Al la podio estis invititaj de la Prezidanto de la Kongreso, Lia Ekscelenca Moŝto Supera Juĝisto D-ro Mário Matos, la jenajn reprezentantojn: D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj oficiala reprezentanto de Ŝtato Paraíba; Lia Ekscelenca Moŝto Supera Juĝisto D-ro Arnaldo de Alencar Araripe, prezidanto de la O.K.; D-ro Giovanni P. Faraco, oficiala reprezentanto de Ŝtato Santa Catarina; D-ro Deoclécio Lima Verde, oficiala reprezentanto de Ŝtato Ceará; D-ro Gentil Fernandes, oficiala reprezentanto de Ŝtato Rio Grande do Norte; Prof. Horacio Pacheco, oficiala reprezentanto de Ŝtato Rio de Janeiro; Pastro Mariano Plana, reprezentanto de Lia Moŝto Dom Antônio dos Santos Cabral, Ĉefepiskopo de Belo Horizonte; S-ro Generalo Nicanor Guimarães de Souza, subkomandanto de la 4-a Infanteria Divizio; D-ro Abgar Renault, Sekretario de Edukado de Minas Gerais; D-ro J. Rodrigues Seabra, Sekretario de Trafiko de Minas Gerais; Majoro Américo Leão, reprezentanto de la Ŝtata Poliestro; D-ro Paŭlo Campos, reprezentanto de la Sekretario de Financoj de Minas Gerais; D-ro Vinicius Meyer, Direktoro de la Oficiala Ŝtata Presejo; Subkolonelo João Vieira da Cunha, komandanto de la Fajro-Brigado; Leŭtenanto Irineu Adão Redec, reprezentanto de la komandanto de la 10-a Regimento de Infanterio; D-ro Carlos Alencar, reprezentanto de Lia Urbestra Moŝto D-ro Octacílio Negrão de Lima; Prof. J. B. de Melo e Souza, reprezentanto de la Urbestro de Distrito Federal; D-ro Noraldino de Melo Castro, re-

MEMORIGA FOLIO



EMISSÃO PARTICULAR, EM PERGAMINHO, DE :  
 SOCIEDADE MINEIRA DE ESPERANTO - C. POSTAL, 801 | SOCIEDADE FILATELICA DE M. GERAIS - C. POSTAL, 158  
*Carlos Pezussa* | *F. Barbosa*  
 (PRESIDENTE) | (PRESIDENTE)  
 CARÍMBO AUTORIZADO PELA DIRETORIA GERAL DOS CORREIOS E TELEGRAFOS - EDITAL: DIÁRIO OFICIAL DE 10/9/1949  
 TIRAGEM - 500 EXEMPLARES | Nº 195  
 PREÇO CR\$10,00

prezentanto de la Urba Parlamento de Belo Horizonte; S-ro José Castilho, reprezentanto de la Urbestro de Ribeirão Preto, Ŝtato S. Paŭlo.

(*Rimarko.* Tiam ne estis en la kongresejo la oficiala reprezentantaro de Ŝtato S. Paŭlo, kiu alvenis la kongresurbon nur la 22-an.)

Muzikistaro ludis la Brazilan Nacian Himnon en la komenco de la kunsido kaj ĥoro kantis la esperantistan himnon «La Espero».

Per brila parolado Lia Ŝtatestra Moŝto salutis la kongresanojn, dirante, ke ili estas bonvenintaj en Minas Gerais, kaj per trafaj vortoj montris sian simpatian al la afero Esperanto. En alia loko ni publikigas lian paroladon.



Salutis la Ŝtatestron kaj la Kongreson la oficialaj reprezentantoj de aliaj Ŝtataj Registaroj kaj la Prezidanto de la Kongreso, D-ro Mário Matos, kiu estas altestimata verkisto. Fraŭlino D-rino Helena Kiss deklamis poemon de Prof. F. V. Lorenz, salutantan la Kongreson D-ro Carlos Domingues, prezidanto de B.E.L., faris la kutiman salutparoladon en ties nomo.

Ĉiuj paroladoj de la kunsido estis disaŭdigitaj per longaj kaj mallongaj ondoj de Rádio Inconfidência, PRI 3, oficiala radiostacio de la Registaro de Minas Gerais, kaj la tutan kunsidon filmis la «Agência Nacional». Perradian raporton faris en nacia lingvo D-ro Paulo Lessa kaj en Esperanto D-ro Wilson Veado.

#### UNUA LABORKUNSIDO

Je la 8-a horo de la 22-a efektivigis la unua laborkunsido, sub prezido de Prof. A. Caetano Coutinho. Diversaj dankesprimoj por servoj al nia movado estis aprobitaj. Diskutitaj kaj aprobitaj estis la jenaj tezoj: «Kiel la Kursoj de Esperanto devas esti kondukataj», de D-ro Giovanni P. Faraco; «Helpe al la Profesoroj de Esperanto», de

D-ro Aristóteles Juvenal de Faria Alvim; «Enkonduko de Esperanto en Gimnaziojn», de D-ro Miguel Timponi. La aŭtoro de ĉi tiu lasta tezo proponis la disdonadon de premioj al gimnazianoj, kiuj plej distingigos en la lernado de Esperanto, kaj donacis al B.E.L., kune kun sia propono, la unuajn tri premiojn por konkurso inter gimnazianoj. Tiuj premioj estas: 1-a, «Premio D-ro Zamenhof» — Ora Medalo kun verda stelo; 2-a, «Premio D-ro Couto Fernandes» — Arĝenta medalo kun verda stelo; 3-a, «Prêmio D-ro Baggi de Araujo» — Bronza Medalo kun verda stelo. Tiuj belaj medaloj estas vera tento por la sukcesontaj gimnazianoj.

#### VIZITO AL LA URBESTRO

Je la 14-a horo de la 22-a la kongresanoj, kondukataj de sia Prezidanto, vizitis D-ron Negrão de Lima, Urbestron de Belo Horizonte, por danki lian altvaloran apogon al la Kongreso. En la luksa salono de la Urbestrejo, Lia Moŝto, ĉirkaŭita de ĉiuj siaj Sekretarioj, akceptis la kongresanojn kaj esprimis sian simpatian al niaj Ideo kaj Movado. En nomo de la Kongreso pa-



*Solena malferma Kunsido — 21-9-49 — Instituto de Educação  
— La Ŝtatestro Milton Soares Campos parolas*



rolis D-ro Giovanni P. Faraco, reprezentanto de la Registaro de Santa Catarina. Per bela improvizo la Urbestro dankis la viziton kaj invitis la kongresanoj al bankedo, kiel gastojn de la Urba Registaro.

### VIZITO AL LA ŜTATESTRO

Ankaŭ la 22-an la kongresanoj vizitis, en Palaco Liberdade, Lian Ŝtatestran Moŝton, D-ron Milton Soares de Campos, ankaŭ por danki lian apogon al la Kongreso. En la Rozkolora Salono de la Registara Palaco, la Ŝtatestro kaj liaj Sekretarioj kaj Helpantoj afable akceptis la kongresanojn. Esprimante la sentojn de la brazilaj esperantistoj, parolis Prof. J. B. de Melo e Souza, kiu dankis la apogon de la Ŝtatestro kaj reliefigis, ke tiu Kongreso malfermas novan epokon en la Historio de Esperanto en Brazilo.

Dankante la apogon de la Sekretario de Edukado, D-ro Abgar Renault, parolis D-ro Gentil Fernandes. Fine, en sia propra nomo kaj en nomo da la Ŝtatestro, parolis D-ro Abgar Renault, por danki la viziton kaj konfirmi la apogon de la Registaro al la afero Esperanto.

Tiun viziton filmis la «Orbis Filme» por la «Agência Nacional».

### KONCERTO DE SINFONIA ORKESTRO

Je la 20-a horo de la 22-a, la Kongreso havis specialan koncerton de la Sinfonia Orkestro de Belo Horizonte. La unua muzikpeco estis la himno «La Espero», de Félicien du Ménéil.

### FUTURISMO KAJ ESTONTECO

Je la 8-a horo de la 23-a la kongresanoj vizitis la belan kvartalon Pampulha, kie oni konstruas Universitatan Urbon por estonta sidejo de Universitato de Minas Gerais. Tie estos ĉiuj fakultatoj, institutoj, muzeoj, astronomia observatorio k.a. Tie estas konstruita laŭ futurisma arto tre diskutita preĝejo. La konstruaĵon faris la «moder-

nisma» arkitekto Oscar Niemeyer kaj la pentraĵojn la genia strangulo Cândido Portinari. Ĝi estas tre originala, sed la Ĉefepiskopo rifuzis konsekri ĝin, kaj tial la fama «Preĝejo de Sankta Francisko» farigis «Muzeo de Moderna Arto».

### LA REKTORO DE LA UNIVERSITATO AKCEPTAS LA KONGRESON

Je la 14-a horo de la 22-a Lia Rektora Moŝto D-ro Otávio Magalhães akceptis la kongresanojn en la Nobla Salono de la Rektorejo. En nomo de la Kongreso salutis Lian Moŝton la estro de la oficialaj reprezentantoj de la Registaro de Ŝtato S. Paŭlo, Prof. Rone Amorim. Dankante la viziton, la Rektoro petis, ke iu ĉeestanta instruisto de Esperanto faru provlecionon de la lingvo antaŭ li. La juna instruisto de la Cseh-Metodo, S-ro Nelson Pereira de Sousa, aliris al la nigra tabulo kaj anoncis lecionon, petante, ke Lia Rektora Moŝto dum momento estu lernanto. Li afable sidiĝis kiel lernanto, plej atente aŭskultis la lecionon kaj respondis la demandojn de la instruisto. Post kelkaj minutoj li jam scipovis diri frazetojn en Esperanto kaj deklaris: «Estas al ni eble krei devigan kurson de Esperanto en la Universitato!»

### DUA LABORKUNSIDO

Post la vizito al S-ro Rektoro, la kongresanoj kunvenis por la dua laborkunsido, sub prezido de Prof. A. Caetano Coutinho, 1-a vicprezidanto de la Kongreso. Plurajn salutojn la Sekretario legis; diversajn proponojn de dankesprimado oni aprobis entuziasme. Post duhora laborado, S-ro Ismael Gomes Braga, el la komisiono por tezoj kaj proponoj, memorigis la kunsidantojn, ke vespere okazos la lasta laborkunsido, sed, se la kongresanoj kuraĝos elteni ankoraŭ nur du horojn, li elĉerpos sian paperujon kaj la vespero estos libera por pli agrablaj taskoj. La prezidanto voĉdonigis tiun proponon: kiuj kuraĝas plu labori ĝis la fino, tiuj restu sidantaj! Unuanime aprobita!



Parolis D-ro Aristóteles Juvenal de Faria Alvim, por legi biografion de nia karmemora samideano Prof. Cícero Pereira, kaj disdonis al gelernintoj la premiojn «Prof. Cícero Pereira». Oni diskutis kaj aprobis la jenajn tezojn: «Esperanto en Turisma Kampanjo», de S-ro Oswaldo Ferreira de Melo; «Esperantista Gazetaro», de S-ro Alberto Flores kaj S-ino Clecy Zamora Flores; «Sugesto de la Esperantista Societo de Porto Alegre pri la lernado de Esperanto en lernejoj kaj organizaĵoj de la Registaro»; «Kompara Studo de Esperanto kun Naciaj Lingvoj», de Prof. Subkolonelo Wanderley Francisco Gonçalves. Ĉi tiu lasta estas eminenta verko de klera lingvisto, kiu ne povis viziti mem la Kongreson; ĝin legis S-ro I. G. Braga.

Por plenumi la proponon de D-ro Miguel Timponi pri la enkonduko de Esperanto en Gimnaziojn, estis nomita la jena Komitato: D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B.E.L.; D-ro Miguel Timponi; Subkolonelo Wanderley F. Gonçalves, kaj Prof. J. B. de Melo e Souza.

### ĈE LA URBA PARLAMENTEJO

Por danki du leĝojn favorajn al la Kongreso, la kongresanoj vizitis la Urban Parlamenton. Ilin afable akceptis la Prezidanto, S-ro Pastro Cyr Assis de Assunção, kiu salutis la vizitantojn kaj donis la parolon al la oficiala oratoro elektita de li por tiu solenaĵo, nome D-ro Noraldino de Melo Castro, kiu elokvente esprimis la sentojn de la parlamento al la Kongreso en sia ĉefurbo. En nomo de la Kongreso dankis D-ro Mário Ritter Nunes. La du leĝoj de la urbo estis: 1) Aprobo de monhelpo de Cr\$ 30.000,00 por la Kongreso; 2) Oficialigo de la nomo «Placo Esperanto» por unu el la placoj de la Ĉefurbo de Minas Gerais.

### EN LA TERKULTURA PUNDOMO

Unu el la ekskursoj de la Kongreso estis vizito al la Modela Pundono de Neves, kie ilin akceptis la Direktoro, D-ro Ivan

Morais de Andrade kaj liaj helpantoj. Tre favoran impreson faris la administrado de tiu grandega «palaco», kie la kondamnitoj lernas plej diversajn metiojn, laboras en terkulturado, havas industriojn kaj preskaŭ forgesas, ke ili dumtempo ne estas liberaj homoj. La Direktoro regalis la vizitantojn per lunĉo kaj dankis la viziton. En nomo de la kongresanoj dankis la afablan akcepton D-ro Nelson de Toledo Piza, el Santos.

### DEKJARA MUZIKMAJSTRO

Ĉe la oficiala Radiostacio, Rádio Inconfidência, kaj en Instituto de Edukado, la kongresanoj havis la okazon admiru genian infanon, Luís Fernando Viegas, dekjaran, kiu majstre ludas per fortepiano la plej malfacilajn muzikaĵojn de klasikaj komponistoj. Lin prezentis al la aŭskultantaro en la aŭditorio de PRI 3, D-ro Wilson Veado, direktoro de la oficiala programo en Esperanto «Brazila Kroniko». Kiam tiu mallongpantalona majstreto estis 7-jara, li unuan fojon aperis antaŭ la publiko kaj ludis 15 malfacilajn muzikaĵojn de mondfamaj aŭtoroj. La ĉefurbo de Minas Gerais estas nomata ankaŭ Ĝardenurbo, Urbo de la Rozoj, k.a. pro siaj multenombraj ĝardenoj kaj belaj rozoj, sed ĝi estas ankaŭ Urbo de Intelektuloj kaj Artistoj pro la multeco de famaj Fakultatoj, Institutoj, Altlernejoj kaj kolegioj, kiuj altiras talentulojn el ĉiuj partoj de tiu granda ŝtato kaj de aliaj regionoj. Rimarkinda trajto de la supereco de tiu granda artisto en malgranda korpeto, estas lia sereneco antaŭ la aplaŭdoj de la publiko: la bruego de la aŭskultantaro lin neniel tuŝas; li daŭrigas tute trankvile sian programon!

### SPECIALA PROGRAMO DE PRI 3

Anstataŭ duonhora, kiel ĉiusabate, en la 24-a de Septembro la oficiala programo de la radiostacio de la Registaro de Minas Gerais okupis tutan horon, per mallongaj ondoj. La Direktoro de tiu jam fama programo, D-ro Wilson Veado, verkis specialan rakonton, tiam luditan kun la helpo de





*Ekspozicio Esperantista*

kongresanoj el aliaj urboj. Tiu originala rakonto estas «La Tapiro».

#### FERMO DE LA UNUA PARTO

La Kongreso havis du fermkunsidojn: en la 24-a estis la fermo de la laboroj, kaj la 28-an finiĝis la ekskursoj. Je la 20-a horo, de la 24-a, en Instituto de Edukado, okazis la fermkunsido de la unua parto. D-ro Gentil Fernandes, 2-a Vicprezidanto, malfermis la kunsidon, kaj invitis D-ron Abgar Renault, Sekretarion de Edukado, por prezidi la solenan kunsidon. Paroladis en nomo de la kongresanoj Prof. Horácio Pacheco, reprezentanto de Ŝtato Rio de Janeiro. Per brila, erudicia parolado, D-ro Abgar Renault fermis la kunsidon kaj do la unuan parton de la Kongreso, kaj invitis la kongresanojn al la teatra ludado, kiu tuj sekvis.

#### TEATRO

Dank'al lerta preparado de la amatoroj fare de S-ro Francisco de Andrade, du belaj komedioj estis tre lerte luditaj de novebakitaj geesperantistoj. En Esperanto la komedio «Kia Ideo!», de Louise Briggs; en

portugala lingvo «A Herança de Kloda rek», de Félicien du Ménéil, el la franca lingvo tradukita de Prof. J. B. de Melo e Souza.

#### DU «PROFESOROJ APROBITAJ»

Antaŭ la tempo de la Kongreso, en la sidejo de B.E.L., la argentinaj kongresanoj S-roj Floreal Villar kaj José Martínez sukcesis en la superaj ekzamenoj por la diplomo «Profesoro Aprobata» kaj solene ricevis siajn diplomojn el la mano de la Sekretario de Edukado, D-ro Abgar Renault, dum la solena ferma kunsido de la laboroj.

#### DISERVO POR KATOLIKOJ... KAJ ALIAJ

En la mateno de la 25-a, en la belega gotika preĝejo Lourdes, la kongresano Pastro Mariano Plana faris Meson kaj predikis en Esperanto. La preĝeja orkestro, sub gvido de Prof. Walter Cardoso, ludis la himnon «La Espero». La preĝejo estis plenplena de katolikaj kaj nekatolikaj esperantistoj, kiuj respektplene aŭskultis la Meson.



## MUZIKFESTO

En la vespero de la 25-a la kongresanoj ĝuis imponan artfeston, aranĝitan de F-inoj Lúcia Veado kaj Waldir Rolim. Longa programo bele ludita, en kiu partoprenis la dekjara majstreto Luís Fernando Viegas. El tiu bela programo, pro sia tuta fremdeco, plej impresis la ĉina opereto «Ge-fratoj plugas».

EN LAGOA SANTA KAJ GROTO  
LAPINHA

Laŭ la regionaj tradiciaj festoj, la akcepto al la kongresanoj en la malnova urbo Lagoa Santa efektiviĝis per eksplodoj de raketoj kaj ludado de belaj muzikoj fare de la urba muzikistaro. Larĝa rubando, de unu al la alia flanko de la ĉefa avenuo de la urbeto, per grandaj literoj bonvenigis: «Kongresano: Lagoa Santa salutas vin!» Per amika parolado la urbestro, D-ro Lindouro Avelar, akceptis la kongresanojn kaj ilin invitis en sian hejmon, kie li regalis ilin per bongustaj vinoj. Post la vizito al la urbestro la kongresanoj veturis al la fama Groto «Lapinha», kie ili povis admiri la plej mirindajn stalaktitojn kaj stalagmitojn. Ilin gvidis la prezidanto de la Scienca Akademio de Minas Gerais, Prof. Anibal Matos, historiisto, paleontologiisto, arkeologiisto, skulptisto, verkisto kaj poeto, kiu faris interesan prelegon pri la lastaj eltrovaĵoj de la Akademio, kiun li prezidas.

Je la 14-a horo la kongresanoj tagmaĝis en Lagoa Santa, kaj aliris al la kampodomo de la vigla esperantisto D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, vicprezidanto de la O.K. kaj ĉefaganto en la preparado de la Kongreso; tie S-ino Coutinho ilin regalis per regionaj bongustaj manĝaĵoj.

ATESTOJ POR NOVEBAKITAJ  
SAMIDEANOJ

En Instituto de Edukado, la 26-an je la 20-a horo, bela muzik — kaj poezifesto solenis la liveron de atestoj al lernintoj laŭ la Cseh-Metodo. 30 geknaboj ricevis la

diplometojn post la kursoj gvidataj de Manuel Rodrigues de Carvalho kaj Aldino de Freitas. Paroladis D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B.E.L., kiu instigis la novulojn fariĝi lertaj kaj agemaj esperantistoj por la movado. La kunsidon prezidis juĝisto D-ro Carlos Rezende, Prezidanto de la Esperanto-Societo de Minas Gerais. En nomo de la diplomitoj parolis F-ino Maria da Conceição Alves Pereira.

## LA EKSĈEFURBO DE MINAS GERAIS

En la 27a la kongresanoj veturis al la historia urbo Ouro Preto, iama ĉefurbo de la ŝtato, fama pro la malsukcesinta revolucio ĉefita de Tiradentes, kiu poste fariĝis idolo de la nacia liberigo. En la stacidomo akceptis la vizitantojn la urbestro, Majoro Antonio Alves de Brito Neto, kiu bonvenigis la kongresanojn. En nomo de la kongresanoj dankis D-ro Giovanni P. Faraço.

## EKSKURSO AL HISTORIA URBO

La 28-a la kongresanoj veturis al la historia urbo Sabará. Tiu malnova urbo, fondita de la fama pioniro de la koloniigo de Brazilo, Borba Gato, ŝajnas muzeo pri la historio de Brazilo: riĉaj antikvaj preĝejoj, muzeo de la malnovaj orminejoj, famaj skulptaĵoj, antikvaj dokumentoj, sed ankaŭ tre moderna ferfandejo, kiu afable akceptis la esperantistojn, montris la funkciadon de la granda industrio kaj fine regalis ilin per lunĉo, kiun en la nomo de la kongresanoj dankis S-ro Ismael Gomes Braga.

## ĈE ROTARY CLUB

Afable invititaj de Rotary Club de Belo Horizonte al vespermanĝo, la kongresanoj igis sin reprezenti de S-roj A. Caetano Coutinho, Pastro Mariano Plana kaj Ismael Gomes Braga. En nomo de la Klubo, S-ro João Viana salutis, en perfekta Esperanto, la kongresanojn, kaj S-ro Ismael Gomes Braga dankis la gastigantojn.



## LA SOLENA FERMA KUNSIDO

Tute originala estis la lasta kunsido: gastoj de la Urbestro, en bela bankedo, la kongresanoj ĝoje festenis, regalitaj per bongustaj manĝaĵoj kaj vinoj, sub prezido de Lia Urbestra Moŝto, kiu brile montris la faman gastamon de Minas Gerais. Ĉe la luksa «Iate Golfe Clube», super la lago en Pampulha; abundas floroj; ĉe la enirejo la Urbestro kaj liaj helpantoj akceptas la kongresanojn. Apud la eminenta gastiganto sidas la Prezidanto de la Kongreso, D-ro Mário Matos, la Prezidanto de la Urba Parlamento kaj parlamentanoj D-ro Noraldino de Melo Castro kaj Jorge Ferraz, reprezentantoj de la ŝtatestro, de registaroj de aliaj ŝtatoj, la Prezidanto de la O.K., D-ro Arnaldo de Alencar Araripe. En nomo de la Kongreso dankas ĝia Prezidanto; en nomo de la delegitaroj parolas D-ro Rone Amorim, oficiala reprezentanto de la registaro de ŝtato S. Paŭlo; memore pri la mortintaj membroj de B.E.L. parolas ties Prezidanto, D-ro Carlos Domingues; en nomo de B.E.L., S-ro Ismael Gomes Braga dankas la distingindan gastiganton pro tiu afablaĵo kaj la Organizan Komitaton pro ĝia brila laboro.

La solenan adiaŭan paroladon faris tre brile Lia Urbestra Moŝto, kiu sin deklaris esperantisto kaj entuziasme kuraĝigis nian laboron. En alia loko ni presas resumon de tiu bela parolado. Ĉe la lastaj vortoj de Lia Moŝto, kun bondeziroj al la kongresanoj, ĉiuj starante kantis la himnon «La Espero».

## PAROLADO DE D-RO MILTON SOARES DE CAMPOS

*Ŝtatestro de Minas Gerais, en la malferma kunsido de la XII-a Brazila Kongreso de Esperanto, la 22-an de Spt<sup>o</sup> 1949.*

Kun fiero mi ricevis la inviton por prezidi la malfermon de la XII-a Brazila Kongreso de Esperanto, en ĉi tiu Ĉefurbo, kaj plezure mi estas tie ĉi, por montri la estimon de la registaro de Minas Gerais al

la sindona kaj fruktoporta klopodado de la esperantistoj de nia lando.

Bone inspirita estis via ideo fari la Ĉefurbon de Minas Gerais sidejo de via XII-a Kongreso. Mi mem atestas la brilon de la Unua Konvencio de Esperanto en Minas Gerais, en Novembro de 1947, okaze de la festoj memorigaj pri la Ora Jubileo de Belo Horizonte. Nenion alian oni povus ja atendi. La komenco de la Esperanto-movado estis en 1887, kiam D-ro Zamenhof eldonis sian unuan libron, kaj jam en 1904, do antaŭ la efektivigo de la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu havis lokon en Boulogne-sur-Mer en la jaro 1905-a, en Minas Gerais oni faris la unuan kurson de la nova lingvo en nia lando, nome en la malnova urbo Ouro Preto. La IV-a Brazila Kongreso de Esperanto, en 1911, okazis en Juiz de Fora, kaj en 1925 estis fondita en Belo Horizonte esperantista klubo — la *Montara Esperanto-Klubo*.

Estis ĉiam rimarkinda do la intereso de Minas Gerais pri la movado de la helpa lingvo.

Aliflanke, la humanecaj iniciatoj, prenataj en la mondo, neniam renkontas indifera la popolon de Minas Gerais, kaj Esperanto estas tiaspeca iniciato. Ĝi intencas esti helpa idioma universala, kiu, sen malutilo de la nacia lingvo de ĉiu popolo, starigu bazon por pli ĝenerala interkomprenigo de la popoloj. Ĝin inspiras do idealo de universaleco kaj kunfratiĝo, kio signifas idealon de paco.

Nu, nenio estas pli kara al la karaktero de Minas Gerais, ol tiu ideo de konkordo kaj harmonio, konstanta aspiro en la koro de ĉiu el ni. Pri ni oni povas diri tion, kion oni jam diris pri alia popolo, nome, ke ni bezonas la tutmondan feliĉon, por senti nin feliĉaj. Precipe nun, kiam la facileco de la transportoj kaj la ĉieestado de la homo ĉiam pli faras la vastan mondon «unu sola mondo», ĉia emocio aŭ okazantaĵo, kie ajn sur la Tero ĝi fariĝas, nepre resonas en ni. Hodiaŭ ni konstatas kiel prava estis Eduardo Prado, kiam li nomis la homon, kie ajn tiu naskiĝis, sia «samplanedano».



La Esperanto-Movado partoprenas en tiu nobla revo de alproksimiĝo de la homoj, kaj tio sufiĉas, ke ĝi meritas nian senkondiĉan apogon. Ne la internaciaj traktatoj, nek kompromisoj inter registaroj, starigas pacon inter la nacioj. Paco regos en la mondo nur tiam, kiam ĝi estos ideo kaj decido kun radikoj fiksitaj en la koroj de la homoj. En tiu direkto al ĉiu el ni koncernas do klopodo, kiu estas granda devo kontraŭ la homaro.

La esperantistoj estas entute propagandistoj de la homara konkordo, kaj Esperanto estas instrumento de universala frateco.

Tial vi estas bonvenaj kaj vi trovas en ni solidarecon. Por esprimi al vi nian aplaudon, mi estas tie ĉi; sub la inspiro de tiuj noblaj sentoj, naskitaj de via iniciato, kaj dezirante la plej bonan sukceson al viaj laboroj, mi deklaras malfermita la XII-an Brazilan Kongreson de Esperanto. (\*)

#### PAROLADO DE EKSMINISTRO D-RO OCTACÍLIO NEGRÃO DE LIMA,

Sinjorinoj, Sinjoroj,

Venis nun la momento de la fermo.

Antaŭ ne multaj tagoj ekfunkciis tiu ĉi Kongreso, komenca ŝtono por novaj kaj pli viglaj klopodoj.

El la ĝojo de ĉiuj kongresanoj kaj laŭ la paroladoj de iliaj brilaj oratoroj, oni konstatas, ke la klopodoj faritaj estis kvazaŭ semado sur fruktodonan grundon.

Iu tre saĝe diris, ke «la bonojn de scio oni pli klare sentas, ilin komparante kun la malbonoj de nescio». Tion la suferoj de la nuna mondo instruas al ni. Malklereco, miskomprenemo, avideco, diverseco de la konceptoj pri la vivo — ĉio kōndukas nin al tria timige detruema mondmilito. En ĉi tiu momento la homaro serĉas la vojon al sinsavo. Kiel oni akordiĝu la interesojn

kaj bridu la ambiciajn impulsojn, se la homoj ne interkompreniĝas pri la celoj mem de la vivo kaj pri la esenco de la vera Bono?

Estas videbla unueco en la verko de la Kreinto. Tiu unueco, brile montriĝanta en la beleco de la universo, devas rebrili en la socia organizado.

La vojo al savo estas la frata kuniĝo de la destinoj.

La idoj de Noa, laŭ la Mosea rakonto, sin bazante sur la premiso, ke Babilono estis la pordo al ilia dio, konkludis, ke la babela turo, kies bazo estus la tempo, estos la ŝtuparo al la ĉielo.

La aspiro altiĝi al la senfino estas kaj montras la inklinon de la kreito unuiĝi kun Dio. Sed la filoj de Noa volis atingi la ĉielon nur per la laboro de siaj manoj. Ili faris fierajon, kiu pereigis ilin. La puno estis la konfuzo de la lingvoj. Ek de tiu tempo la homoj perdiĝis en nescio.

Fama verkisto en Minas Gerais asertas, ke religia unueco, geopolitika unueco kaj lingva unueco estas la tri lateroj de la triangulo, reprezentanta la *Patrolandon Unuecon*.

Se ni pligrandigus la koncepton de tiu triangulo ĝis tia grado, ke ĝi ampleksus marojn kaj kontinentojn, tiu sama formulo certe povus esti aplikita al la serĉado de la *Universala Unueco*, ĉar la homaro ja celas ĉi tiun grandan idealon, ankoraŭ ne precize difinitan en la tempo kaj perditan en la iluzio de revoj.

Ekzistas tri grandaj fortoj je la servo de la *Universala Unueco*. Oni povus nomi ilin «la tri muskedistoj de la *universaligo*».

La plej granda el ili estas Kristanismo, potenca unuiga forto, kiu formas unu el la lateroj de la triangulo de universaligo. Egale ĉu la malpiuloj kredas aŭ ne, la Evangelio de la Kristo, praktikata de la plej civilizitaj popoloj de la mondo, kaj venkinte netolerecon, indiferentecon kaj kontraŭan kritikemon, malfermis novajn senlimajn horizontojn per la socia agado komencita de «*Rerum Novarum*».

(\*) Tiu ĉi parolado, kiel ĉiuj partoj de la programo (estis disaŭditaj per ondoj longaj kaj mallongaj de la oficiala radio de Minas Gerais, PRI 3. — *La Red*.)



Aliflanke la fenomenoj de geopolitikaj elvolviĝoj — kia la kuniĝo de la adriatikaj respubliketoj por la starigo de la granda itala regno; kiaj la solidariĝo de nacioj por la formado de la Brita Imperio kaj la unuiĝo de la kvardek ok steloj de Usono — daŭre agadas, kiel pravas la organizaĵo de la U. N.

Falas al ni en la okulojn la geopolitikaj movadoj, pozitiva montro da la universala tendenco al tutmonda ekonomia unueco, kiu estos atingita, kiam estingiĝos la artefaritaj baroj, ĉar naturaj limoj ja ne ekzistas.

Mankas la tria latero: la lingva unueco. Universaligo hodiaŭ parolas al la koro kaj al la interesoj de la homoj pli laŭte, ol la nacia sentimentaleco de la popoloj, ĵaluzaj pri sia tradicia lingvo.

Unueco de lingvo signifas, en eblaj limoj, unuecon de sentoj. La vorto *nostalgio* — kiu vivas en nia brusto — povis aperi kaj eterniĝi nur en la lingvo de tiuj, kiuj ricevis la doloran senton de gitaro kaj travivis la aventuron de la karaveloj, irantaj al nekonataj regionoj.

Esperanto — kiel instrumento de la sento kaj de la ideo — kompletigos la ciklon de sia universaligo, kiam patrinoj ĝin flustre parolos al siaj infanoj, sciencistoj uzos ĝin por reciproka konsultiĝo, kaj sanktuloj por la monologoj de siaj meditoj.

Esperanto ne celas anstataŭi naturajn lingvojn. Sed ĉiam, kiam neŭtraleco kaj universaleco estos kondiĉoj por pacigo en internaciaj kunvenoj, Esperanto estos la harmoniiga solvo de la problemo.

Pli grandan amplekson kaj utilecon Esperanto ekhavas, kiam rigardata kiel instrumento de turismo. Neniu sentas sin tiel soleca kiel homo, kiu en fremda lando aŭdas nur sonojn kaj vortojn, kiujn li ne komprenas.

Migrema pro siaj temperamento kaj naturo, la homo estas senlaca turisto. Kaj turisto li estas ankaŭ pro scivolemo; li esploras la historian pasintecon, kaj koruŝite rigardadas la spektaklojn de la naturo.

Sen ia timo je trograndigo, oni povas aserti, ke la pasintatempaj maraj eltrovintoj estis grandmezuraj turistoj.

En la plezuro de la vojaĝoj estas ja tute aparta gusto, komparinda nur kun la gusto pri la legado: — la mondo estas ampleksa libro kun delikataj ilustraĵoj kaj kleraj instruoj, kiuj plenigas la okulojn kaj satigas la spiriton.

